

trimestriel
1^{er}
trimestre
2009

LA INFORMILO

N° 145

31 mars
2009

l'espéranto



la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto



la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj



ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO


regroupant
les départements
Meurthe-et-Moselle (54)
Meuse (55)
Moselle (57)
Bas-Rhin (67)
Haut-Rhin (68)
Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
" Philippe Desforges "
27, rue de la République
FR - 54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO
annuel / jara
14 €
eksterlando
18 €

Un ouvrage de 250 pages, enrichi
d'une abondante iconographie ex-
clusive, mise à la disposition des
auteurs par le Docteur Zamenhof.
Ouvrage disponible auprès de
notre librosservo, 37, rue Pierre et
Marie Curie, 54500 VANDOEUVRE

" La rue Zamenhof " OU ... de la tragédie à l'espoir ...




Un récit magistral, dans
lequel le Docteur Louis-
Christophe Zamenhof,
petit-fils "rescapé" du
concepteur génial de la
langue internationale,
évoque l'épopée mouve-
mentée d'une famille
sacrifiée.

Cette traduction de
l'œuvre originale en
espéranto, "*La Zamenhof-
strato*", a été menée à bien
par une équipe motivée,
impulsée par Ginette
Martin, laquelle nous avait
déjà permis d'apprécier un
autre récit tout aussi pre-
nant, de Špomenka Stimec,
"*Journal de nuit - Témoi-
gnage de femme dans la
Croatie en guerre*".

Nous devons la couverture de l'ouvrage à un autre espérantiste, Armand Hubert, qui explicite son dessin empreint de symboles...

"L'image de la page de garde illustre les objectifs de Ludovik Zamenhof en créant la langue Espéranto. Un portrait de l'auteur en filigrane... construction d'un pont entre les peuples, un ouvrage ambitieux, en chantier permanent, inachevé... réalisation d'une route empierrée, interrompue -une image du parcours chaotique de l'humanité vers la paix-... Des pavés attendent d'être mis en place... Zamenhof entendait apporter une contribution qu'il estimait essentielle, donner les moyens de s'écouter et de se comprendre entre les hommes".

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la Internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC tel. (+33) 03.29.79.01.44 poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto <i>Président</i>	S-ro Gilbert STAMMBACH 24, rue Albert Zimmer 67610 LA WANTZENAU	03.88.96.67.59	gilbert.stammbach@mageos.com
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Vic-prezidanto Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.ef@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	03.29.79.01.44	pol.denis@orange.fr
Junul-respondeculo <i>Responsable Jeunes</i>	S-ro Frédéric PORRETTI 18, rue de la banlieue 68110 ILLZACH	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
PKK <i>Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asesseeurs	S-ino Marie-Claude BOREGGIO	03.88.96.47.26	marie-claude.boreggio@wanadoo.fr
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille-hurstel@free.fr
	S-ro Robert KUENY	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr

Abono al La Informilo →	Francio: 14 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← <i>Paiement par chèque au nom de</i>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← <i>Paiement par virement au compte</i>
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

SOMMAIRE N° 145			
p. 1	rue Zamenhof	20	vote Suisse
2	ours	21/22	argumentaire. Piron
3	édito	23	legitajoj
4	congrès UFE	24	rarajo (Z)
5/6	congrès UEA	25	Ilona. Koutny
7	calendrier	26	Rose etCyrille
8	Osiek – Espagne	27/29	fille facile
9	clubs locaux	30	kaléidoscope (2)
10	kaléidoscope (1)	31	Karolo la IVa
11/14	IF-festivalo	32	libroservo
15/16	Kuény en Afrique	33	trésorier
17	UNESCO	34	anecdotes
18	activ. Mulhouse	35	distra angulo
19	dépûtée. Novak (UE)	36	photothèque

ISSN 0291 6037 trimestriel
bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle
Espéranto France-Est
MJC Philippe Desforges - 27, rue de la République
54000 NANCY
Directeur de la publication : **Gilbert STAMMBACH**
Rédacteur : **PoI DENIS**
dépôt légal : **31 mars 2009**
imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole
place de l'Ecole Normale, 55000 BAR-le-DUC
N° CPPAP **0409 G 83517**

BACCARAT



assemblée
générale
26 avril

La Ĝenerala Asembleo de ESPERANTO FRANCE-EST okazos tiujare la 26an de aprilo en BACCARAT, inter Nancy kaj St-Dié. Tiu urbo situas plej precize kaj laŭ la plej modernaj matematikaj mezuroj, en la geografia centro de nia orienta federacio... ☺ ...

Ni proponos al vi ne nur kunsidi sed ankaŭ ĝui etan turisman programon por miksi plezuron kaj aktivan laboron. La urbo kaj ties regiono certe prezentos al ni belan nekonatan vizaĝon, kiel la faman kristalfabrikejon.

Antaŭ du jaroj, la komitato elektis min kiel prezidanton de nia federacio. Mi devas konfesi, ke mi opiniis disponigi pri pli da tempo por plenumi mian taskon. Pro multaj kialoj, profesiaj kiuj devigas min iri ofte al Parizo, kaj ankaŭ privataj, mi ŝatus ne rekandidatiĝi al la prezidanta rolo de nia federacio.

La venonta Ĝenerala Asembleo kaj la posta komitat-kunsido estos inda okazo por elekti anstataŭulon. Evidente mi ŝatus daŭre enpartopreni nian regionan movadon kaj resti en la komitato. Mi certe havos pli da tempo, post kelkaj jaroj, kiam mi emeritiĝos, por plie agadi ...

En kelkaj asocioj aŭ politikaj movadoj, ŝanĝi la gvidanton estas ofte vere granda krizo. Ni tamen scias, ke tio ne validas ĉe ni, en asocio, kiu emfazas la egalrajtecan rilatojn. En tiu senco, mi ŝatus danki al ĉiuj komitatoj por iliaj efikaj laboroj dum tiuj du jaroj.

————— Gilbert —————

Les membres de notre association **Esperanto France-Est** à jour de leur cotisation 2009 (payée à notre association ou à UFE) ont le droit de participer aux votes de l'assemblée, de se présenter au comité fédéral. Votre candidature est à envoyer à notre secrétaire *Jacques Herlé*.

La carte de membre 2009 ainsi que les rapports financiers leur seront envoyés par courrier individuel une ou deux semaines avant l'Assemblée Générale.

pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...



➔ nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...



apprendre
l'espéranto



chez soi !

*rapidité ...
efficacité ...
deux maîtres- mots
de notre cours
par correspondance !...*

Edmond LUDWIG
26, route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR
03 89 77 52 55

- ★ un matériel adapté
- ★ une technique éprouvée
- ★ un réseau d'animateurs compétents
- ★ un savoir immédiatement opérationnel

*une diffusion
sur toute la région
...et au-delà !*

" ★★★ ?...
- ★★★ !"



... Un site à consulter en permanence !...

aktualigitaj informoj pri estontaj aranĝoj, fotoj pri okazintaj eventoj estas daŭre troveblaj ĉe

<http://esperanto.alsacelorraine.neuf.fr>

ĝi estas la retejo de nia asocio, informas pri ĝiaj aktivecoj, pri la lokaj grupoj kaj pri Esperanto

multaj ligoj ebligas rapide trovi aliajn interesajn tetejojn en Francio kaj en la mondo

BIENVENUE EN CHAMPAGNE

Congrès National Interassociatif de l'Espéranto en France. "Centre Sportif de l'Aube" - 5 rue Marie Curie - 10000 TROYES du 7 au 11 mai 2009.



En collaboration avec **Espéranto-France**, l'association départementale **Espéranto10** assure l'organisation de cette importante manifestation.

Le congrès se déroulera dans un lieu spacieux et agréable.

Vous trouverez dans le Centre, accessible aux handicapés, tout le nécessaire pour un travail studieux avec accès internet dans toutes les salles et un self-service pour vous restaurer.


Un programme varié et attrayant vous sera proposé.

Le programme provisoire, les informations pratiques et le bulletin d'inscription sont téléchargeables sur sur le site de **Esperanto 10**
<http://esperanto10.free.fr>



BONVENON EN ĈAMPANJO !

La Nacia Interasocia Kongreso de Esperanto en Francio ĉi-jare okazos en la urbo **TROYES**
de la 7a ĝis la 11a de majo 2009.



Kunlabore kun **Espéranto France**, la loka asocio **Espéranto10** zorgeme organizas tiun gravan okazaĵon. TROYES estas ne nur la ĉefurbo de la departemento Aube sed ankaŭ la historia ĉefurbo de Ĉampanjo, kiel montras multaj atestaĵoj.

La kongreso okazos en vasta kaj agrabla loko,

"Centre Sportif de l'Aube" - 5 rue Marie Curie - 10000 TROYES

En tiu kongresejo, alirebla por handicapuloj, vi trovos ĉion necesan por studema laboro: interretan konekton en la kongresaj salonoj, kaj memservan restoracion.

Diversa kaj alloga programo estos proponata:

- Vizitoj en la historia urbocentro de Troyes.
- Prelegoj kaj spektakloj.
- Unutaga ekskurso kun vizito en ĉampankelo.


La provizora programo, la praktikaj informoj kaj la aliĝilo estas legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe la retpaĝoj de **Esperanto 10** :
<http://esperanto10.free.fr>

Esperanto-France (UFE) kaj **Esperanto10** invitas vin. Aliĝo estas senpaga por eksterlandanoj.

Bonvenon en Troyes!

Claude Nourmont

dernière minute !...



http://www.assimil.com/eNewsLetter/mars2009.htm#LIRE_ESPERANTO
à paraître en mars 2009

Guide de conversation Espéranto.

Le guide propose des mots clés, des phrases par thèmes, des expressions courantes et un lexique rassemblant le vocabulaire utile.

Collection : Langues de poche

Format : Livre couleur 10,5 x 14,5

Prix : 8,90 € TTC

Universala Esperanto-Kongreso 2009



94-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
25 julio – 1 aŭgusto 2009
Bjalistoko, Pollando

Kongresa numero:

ALIĜILO
BJALISTOKO

Konstanta adreso:
94-a UK de Esperanto
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
www.uea.org (blas aliĝi ankaŭ rete)

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON. FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON – BONVOLU
TAJPI AŬ SKRIBI PRESILITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO VIRONVIRINO
(por alfabeto ordigo) (forstrika unu)

PERSONA(J) NOMO(J) UEA-KODO

ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun postkodo)

LANDO TEL. (kun prefikso)

NASKIĜDATO RETADRESO

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. (Aliĝojn sen kotizpago oni ne traktas.)

Mi sendas ĉi tiun aliĝilon al mia landa peranto kaj samtempe pagas al tiu (vidu dorse sube).

Mi sendas ĉi tiun aliĝilon al la CO en Roterdamo kaj pagas laŭ suba specifo:

al ABN-Amro-konto n-ro 42.69.01.444 en la nomo de la UK (aldonante 7 eŭrojn), IBAN-

kodo: NL86ABNA0426901444, SWIFT(BIC)-kodo: ABNANL2A.

al Postbank-konto n-ro 627337 (aldonante 7 eŭrojn, por nederlandanoj sen kostoj);

el EU-landoj, IBAN-kodo: NL48PSTB000627337, BIC-kodo: PSTBNL21 (sen kostoj).

per ĉeko favore al UK de Esperanto (aldonante 20 eŭrojn).

per Visa/Amex/Mastercard n-ro valida ĝis

Visa- kaj Mastercard-kontrolnumero (tri ciferoj, dorse de la karto)

al la poŝtekkonto de UEA en (Belgio 000-1631831-97;

Germanio 3182 91 509 BLZ 370 100 50 Kbln; Svedio 74374-0; Svislando 12-2310-0).

per PayPal (interreta pag sistemo; al <financoj@co.uea.org>).

bonvolu debeti al mia UEA-konto, kie estas sufiĉa bonhavo:

Mi ne volas ke mia adreso aperu en la Kongresa Libro.

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto:

Se vi aliĝas kiel handikapulo, ĉu UEA jam havas atestilon? jes / mi konsentas (forstrika unu)

Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorse):

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn dorsflanke sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO SUBSKRIBO

Por uzo de la administracio / peranto:	KOTIZO (vidu dorse)
UEA-membro en kategoriojaro	DONACO AL KONGRESO
UEA-spezfolio n-ro:	BLINDULA KASO
konfirmo de peranto:	INFANA KONGRESETO
PAGO EN CO	FONDAĜO CANUTO
KONFIRMO	TRIAMONDA FONDAĜO
notoj	KOSTOJ (7 aŭ 20 eŭroj)
	ENTUTE (en eŭroj)

infan-kongreseto 2009

junular-gastejo « Bukowisko »

Supraŝl



La kotizoj varias depende de la loĝando de la aliĝanto, laŭ la jena grupo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B.

B: Ĝiaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno, aŭ en la reto ĉe www.uea.org/kongresoj/uk-perantoj.html; ankaŭ pluraŭ aliĝ informoj pri la Kongreso aperas en la UEA-paĝoj). La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 2009. Post tiam, oni aliĝu surloke dum la UK.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAĜAN KLARIGON.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en eŭroj)	ĝis 31 dec. 08		ĝis 31 marto 09		ekde 1 aprilo 09	
	1-a periodo	2-a periodo	A	B	A	B
Aliĝkategorio	A	B	A	B	A	B
1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	160	120	200	150	240	180
2. ne individua membro de UEA	200	150	250	185	300	225
3. komitataro/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	80	60	100	75	120	90
4. kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA	120	90	150	110	180	135

DEFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM aŭ DMJ), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T), *Ne temas pri Aliĝitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

Komitataro: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo. **Kunulo:** Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon, kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 79 01 01 kaj 88 12 31 (inkluzive). Oni ne prete notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo ne prete postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu privivis tion per kuracista aŭ simila aceto, kiu klare indikas la tipon de handikapo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 88 12 31;
- nermalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, ĉe se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, banketon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian assekuron. Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la lindahoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompla pagado oni ne traktos.


Kongresa Regularo (ekstrakto): "8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK." Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton al la Kongresa Regularo kaj la lastanta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj atspicias la Universaliajn Kongresojn.

! Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.

! Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.

— el la "internacia kalendaro de Eo-aranĝoj" – <http://eventoj.hu> —

(noto de la redaktoro de *La Informilo* : tiu listo estas ĉerpita el kvazaŭ komplete kalendaro konsultebla ĉe la supra ret-adreso)

**14. aprilo**

33-a IJF (Internacia Junulara Festivalo) en *Giulianova, Italio*. La tradicia paska renkontiĝo organizata de la Itala Esperantista Junularo pritraktos ĉijare la temon "Eŭropa integriĝo".

Inf.: IEJ, Michael Boris Mandirola, ijf.admin@esperanto.it

9 - 13. aprilo

BAVELo-Treffen bei "Mama Inge" Bruenner Str. 20, *Aalen, Germanio* -

Thema: "*Auf den Spuren der Kelten und Alemannen*".

Inf.: [Inge SIMON](mailto:Inge.Simon)

10 - 17. aprilo

25a Printempa Semajno Internacia en *St. Andreasberg, Germanio*. **PSI** estas granda paska renkontiĝo por la tuta familio, bonvenigas ankaŭ parojn kaj unuopulojn en ĉiu aĝgrupo.

Inf.: Jörg Gersonde, Hermann-Wäschke-Str. 31, DE-06366 Köthen, Germanio. Telefono: +49-(0)3496-558517, Fakso: +49-(0)18050-5511002972, rete: psi@esperanto.de

11 - 14. aprilo

Kongreso de SAT-Amikaro en *Pau, Francio*. SAT-Amikaro estas Franclingva LEAO de SAT.

Inf.: OKK SAT Amikaro, 40 rue Pasteur, FR-64000 Pau, Francio. satamikaro2009@gmail.com

25. aprilo

Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en *Rotterdam, Nederlando*. Inf.: Universala

Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. uea@co.uea.org

7 - 11. majo

Nacia Interasocia Kongreso de Esperanto en la urbo *Troyes* en *Francio*.

Inf.: rete [Claude Nourmont](mailto:Claude.Nourmont)

23 - 29. majo

61a Kongreso de IFEF Internacia Fervojista Esperanto Federacio en *Triesto, Italio*.

Inf.: Triesta Esperanto-Asocio, C.P. 601 Trieste Centro, IT-34132 Trieste, Italio. tel.: +39-040-350093; +39-040-398562, rete: testudo.ts@gmail.com aŭ noredv@tele2.it

28. majo - 3. junio

Eŭropa Esperanto-Kongreso, kune kun Germana Esperanto-Kongreso dum Pentekosto en *ICH/Herzberg*. Detala programo: "*Ĉi tie*".

Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de

10 - 14. junio

2009 Blue floras la genciano 5 (Amuza junulara semajnfino) en *Goldegg, Germanio*

Inf.: Inge Simon, Brünner Str. 20, DE-73431 Aalen, Germanio. Tel.: +49-7361-360615, +49-170-4739318). rete: Inge.Simon

WIKIPEDIO



Wikipedia transpasis la ŝtupon de 111 000 artikoloj : **111 028** (22a loko el 264 lingvoj).

La version en espéranto de **Wikipédia** (**Wikipedia**) a dépassé les 111 000 articles : **111 028** (22ème place sur 264 langues).

— Ĉu vi ŝatas humurumi esperantlingve? —
Tiuokaze, la ci-suba somer-renkontiĝo estas por vi i

INTERNACIA ESPERANTO KONFERENCO EN KONDOROS, HUNGARIO, 18-24 jul 09
prelegoj, debatoj, libroservo, ekskursetoj, kuracaj varmobanejoj...
lingvokurso, programo por infanoj... kaj atribuido de OSIEK-premio 2009

HUMURA LITERATURO EN ESPERANTO



informoj, aliĝoj

Eric LAUBACHER, 1 rue Bougainville
(FR) 78180 MONTIGNY-Bx, Francio
Tel. +33 1 30 96 67 91 rete: kasisto@osiek.org

Pál KOZSUCH, Vasút u. 3,
(HU) 5553 KONDOROS, Hungario
rete: pauljuno@freemail.hu

17-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO EN PINEDA DE MAR Hispanio

Tiu internacia semajno de Kulturo kaj Turismo estas jam tradicia ferio-semajno, kiu okazas fine de septembro aŭ komence de oktobro en Katalunio. Ĝin kutime partoprenas 100 ĝis 150 personoj.

En 2009 ĝis okazos en Pineda de Mar, inter Girona kaj Barcelona, de la 3-a ĝis la 10-a de oktobro 2009 en Hotelo Stella & Spa.
Str. Puntaires, 1,
08397 Pineda de Mar (Katalunio) Hispanio

Aliĝ-kotizo 20 € ĝis 31.07.2009
poste 30 €
Kompleta pensiono en la hotelo:
34 € en dulita ĉambro po persono
kaj tago, 44 € en unulita ĉambro.

Informoj kaj aliĝiloj ĉe:
<http://personales.ya.com/semajno>
Koresponda adreso:
Luis Serrano Pérez. Apartado 423.
ES-08200 SABADELL Hispanio
Tel. (34) 93 727 50 21.
Retadreso: luis_serrano@mixmail.com



Specifan gratulon al niaj samcelanoj Denise kaj Armand HUBERT, kiuj racie kaj fruktodone agadas surloke.

La bulteno "NURA STELETO" -N°46, janvier 2009- parte dulingva, riĉas je interesaj artikoloj.

Post raporto de prelego far *Claude Hagège* en la urba mediateko, kuŝas informoj pri ceteraj eventoj. Kalendaro de la kursoj, de la renkontiĝoj, ampleksa anonco de publika konferenco de Armand Hubert, en februaro, -*Zamenhof, histoire d'un humaniste*- sub la aŭspicoj de la asocio "Relais, Solidarité citoyenne", kiu ankaŭ proponas "après-midis découverte" kun la venonta temo en majo (fak-renkontiĝoj kun titolo "Bonjour voisin"), omaĝo al Litovio, denove en la mediateko.

Paragrafo elvokas aperon de la verko "La rue Zamenhof", pri kiu amplekse raportas aliloke "La Informilo".

MULHOUSE



Monsieur Yann Kerdilés, professeur d'anglais et doyen à l'université de Mulhouse, a tenu une conférence, le 27 février, à la librairie Bisey, avec comme sujet "La mort programmée de l'anglais et la mondialisation de l'espéranto".

D'emblée, il a affirmé que l'anglais n'est pas une langue mais une multitude de dialectes.

Il a mis en évidence les différents parlers de l'anglais qu'il a appelé des "dialectes". L'anglais des chinois, l'anglais utilisé dans une tour de contrôle, celui utilisé en Afrique etc. D'où la difficulté de se comprendre.

Un seul quart des locuteurs anglais sont des natifs qui devront bientôt apprendre l'anglais ou les dialectes des autres locuteurs pour pouvoir effectivement se comprendre. Une mort programmée peut-être d'ici 30 ans.

Il a terminé sa conférence en mettant en évidence le temps nécessaire pour l'étude de l'anglais, **dix ans pour un asiatique** alors qu'**une année suffit pour l'espéranto**.

Ne pourrait-on pas consacrer une année pour l'espéranto pendant la scolarité pour être beaucoup plus efficace ?...

Jen rezultoj de enketo farita en la grupo "Lille-Villeneuve-Espéranto" al 100 demanditoj.

Dato : je la 7-a kaj 9-a de marto 2009.

Nomo de la enketinto : *Claude Longue-Épée*.

Urbo : Lille.

Preciza loko : *Aŭtobus-haltejo* en la centro de la urbo kaj antaŭ la stacidomo.

Daŭro de la enketo (por 100 intervjuitoj) : *entute 3 horojn* (1 matene + 2 posttagmeze, kun proksimume samaj averaĝaj rezultoj).

Ĉiuj demanditoj tuj konsentis respondi.

Proksimume 50 estis ĝis 30/35-jaroj aĝaj, kaj 50 ĝis 60/65-jaroj aĝaj. (laŭ "nazvida" mezuro).

Analizo de la respondoj de la 100 respondintoj.



1 - Al la 1-a demando "Savez-vous ce qu'est l'espéranto ?"

--- 59 neniam aŭdis paroli pri Esperanto. Inter kiuj neniu petis precizigojn !

--- 41 jam konatiĝis kun Esperanto. Kiuj precizigis, ke temas pri "universala" aŭ "internacia" lingvo.

2 - Al la 2-a demando "Comment en avez-vous entendu parler ?"

Inter tiuj 41 personoj konantaj Esperanton :

--- 13 estis sciigitaj de familio aŭ de amikoj

--- 8 estis sciigitaj mere de lernejoj kontaktoj (kun aŭ sen ia inico)

--- 20 estis sciigitaj pere de televido aŭ de iuj amaskomunikiloj.

3 - Al la 3-a demando "Pensez-vous que l'Union Européenne devrait faire connaître l'espéranto ?"

Inter tiuj 41 personoj konantaj Esperanton :

--- 32 respondis "jes" senhezite.

--- 9 respondis proksimume "mi ne scias", sen alia komento.

Samideane,

Claude Longue-Épée

“*La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado*”



Informoj pri la konferenco, ĝia programo, urbo,
partoprenkondiĉoj en
http://ilei.info/konferenco/2009/konferenco_2009.php
Venu al *ILEI-konferenco* por aktive esperantumi
dum *la antaŭ-UKa semajno*
kaj partoprenu ankaŭ **en la ekskurso al salminejo en
Wieliczka !**

komuniko de “La Vortaro”



Karaj abonantoj,

Ni havas la plezuron anonci al vi, ke la *Pola vortlisto* estis plivastigita, dank'al la laborego de Sinjoro *Sebastian CYPRYCH*, kiu aldonis pli ol 10 000 vortojn al la jam ekzistantaj vortlistoj.

Tiu bona iniciato tutcerte estos tre utila ĵus antaŭ la venonta *Universala Kongreso* kiu okazos en Pollando.

Dankegon kaj gratulegon al li !

Vi povos elŭti la novan vortliston je la kutima adreso :

<http://www.la-vortaro.net>

Kiam vi instalos la novan vortliston, la malnova estos aŭtomate anstataŭigita. Dank'al nia re-akirilo vi retrovos viajn proprajn aldonajn.

Bonan elŭton!

Bernard(o)

Jubileo



Ekzakte antaŭ unu jaro, la 5an de februaro 2008, en Kaliningrado (Ruslando) ekfunkciis nova podkasta servo. Komence sentitola, ĝi baldaŭ ricevis la nomon *Radio Esperanto*.

Ĉiu sonprogramo de *Radio Esperanto* enhavas, post la enkonduko de la redaktoro (*Aleksander Korĵenkov*), Kaliningradan felietonon de *Halina Gorecka* kaj Esperanto-novaĵojn. En la programoj estas prezentataj novaj kajeroj de *La Ondo de Esperanto* kaj la plej interesaj tekstoj el ĝi. Precipe ŝatataj de la aŭskultantoj estas niaj konstantaj programeroj literatura kaj muzika.

Entute aperis **19 sonprogramoj**, kiuj dum la jaro estis elŭtitaj **17 225 fojojn**. Averaĝe ĉiu programo estis elŭtita **907 fojojn**. Legu pli detalan statistikon en la rubriko “Novaĵoj” de la retejo <http://esperanto.org/Ondo/>

Radio Esperanto estas aŭskultebla: <http://la-ondo.rpod.ru/>

Radio Esperanto estas abonebla: <http://la-ondo.rpod.ru/rss.xml>

Bonan aŭskultadon!

HaGo, AlKo

PS – Alia jubileo ...

Antaŭ 100 jaroj, en februaro 1909, en Moskvo, aperis la unua numero de “La Ondo de Esperanto”, kiun eldonis *Aleksandr Saĥarov*.

La eldonanto de la nuna “Ondo...”, *Halina Gorecka*, koncize raportas la historion de la fruepoka, en la rubriko “*Nia Trezoro*”, en kiu ĉi-jare aperas prezentoj de gravaj Eo-gazetoj.

Legu ĝin en la novaĵ-rubriko de la retejo <http://esperanto.org/Ondo/>

IF

LA 25-a INTERNACIA FESTIVALO en DÜSSELDORF en Germanio 27.12.2008 - 3.1.2009 Kadra temo: Literaturo



HDP, la konstanta organizanto de IF, refoje donis al ni rendevuon en Düsseldorf kaj eĉ en la sama domo kiel en 2007. Sed fakte ni troviĝis en tute alia parto de la domo, plene modernigita, kun vastaj salonoj, sur pluraj etaĝoj. La knajpo agrable situis en la enireja halo kun vasta spaco por kune babili kaj ĝui la etoson. Nur la dormo-ĉambroj similas al tiuj de 2007.



Krome tiu 25a IF estis jubilea. La vespero por festi la jubileon estis aparte bone organizita kun jubileaj kukoj kaj ŝaŭmvino.

La kadra temo Literaturo proponis interesajn prelegojn. Sed ankaŭ prelegoj pri scienco, pri vojaĝoj estis aparte allogaj. Certe ni ne forgesu la kutimajn programe-rojn kiel ekskursoj, distraj vesperoj, silvestra balo, novjara promeno, kiuj grandparte kontribuis por igi la tutan semajnon vere alloga kaj ĝuinda.

A. Grossmann

Al tiu 25a IF aliĝis 167 personoj el 23 landoj. Inter ili estis pluraj novaj partoprenantoj ankaŭ el landoj ĝis nun preskaŭ ne reprezentitaj, Armenio, Japanio, Argentino.

Jam la 27an de decembro okazis la interkona vespero kun bonvenigaj salutoj de HDP. Li ankaŭ klarigis la situacion de la nuna domo, kies antaŭa estrino ekŝiĝis. Malgraŭ tio li sukcesis solvi ĉiujn administrajn kaj organizajn problemojn.

Mikaelo Bronŝtejn poste prizorgis la ceteron de la vespero per kantoj kaj allogaj ludoj. Al 5 kandidatoj pri vodko estis proponitaj glasetoj da akvo aŭ vodko. La publiko devis diveni laŭ



la aspekto de la trinkintoj, kiu el ili fortrinkis la solan vodko-glaseton. Edmond Plutniak ja aspektis al la tuta publiko la feliĉulo, kiu trafis la ĝustan glaseton. Sed envere ĉiuj el ili havis vodkon en sia glaseto. Aliaj trinkintoj sukcesis tion lerte kaŝi.

Jen aliaj ludoj kaptis la atenton de la publiko kaj amuzigis ĉiujn.



La duobla trompo: kiu el ili fortrinkis vodkon?
Fakte ĉiuj.

Kiom da pilketoj sub la postaĵo?
Malfacile tiel ilin nombri.



Mikaelo Bronŝtejn estas ne nur kantisto, gitaristo, humoristo, verkisto, sed ankaŭ tre kompetenta animanto kaj distranto. HDP ja komprenis tion kaj tial uzas liajn kompetentecojn por pluraj vesperoj dum la IF-semajno.



Diligentaj edzinoj provas blinde kravat-nodi por la edzoj.
Ĉu sukcese??



Jozefo Ŝemer prelegas pri "Juda humuro"

Dum la tuta semajno okazis diversaj samtempaj prelegoj, inter kiuj ja necesis elekti. La matenaj prelegoj okazis de la 10a ĝis la 11a30 aŭ eĉ pli longe. En la posttagmezo okazis du serioj da prelegoj de la 13a30 ĝis la 15a kaj de la 16a30 ĝis la 18a. Pro la samtempeco de la prelegoj, ja necesis bone elekti kaj iel rezigni pri la ceteraj prelegoj.

Aparte interesaj estis la prelegoj de Jozefo Ŝemer el Israelo. Lia temo estis "Juda humuro". Li enkondukis sian prelegon per klarigoj pri la juda religio kaj juda popolo, ties diversaj tradicioj kaj kutimoj en centra Eŭropo kaj aliaj mondpartoj. Li aparte emfazis la malfacilajn regulojn de la juda religio. Eble nur 20% de la popolo sukcesas ilin sekvi kaj eble nur 10% plene respektas ilin. Krome li klarigis, ke dum la jarcentoj estis pli forta tradicio studi ĉe judoj ol ĉe aliaj popoloj. Tial li ne hezitis menciigi plurajn jud-devenajn eminentulojn, sciencistojn tra la mondo, inkluzive Zamenhof. Sed aliflanke granda parto de la popolo estis malriĉa kaj eĉ mizera. Certe tre utila enkonduko por poste pli facile kompreni judajn ŝercojn.

Aliaj prelegoj pri literaturo estis "La mondoj de fratoj Strugackij". La plej famaj rusaj verkistoj de scienc-fikciaj romanoj. Mikaelo prelegis pri ili kaj eĉ povis proponi 7 tradukojn, kiujn li jam sukcesis plenumi..

Enkonduko al la ŝerco:

En la orienteŭropa juda mondo dum jarcentoj estis kutimo, ke malriĉaj judoj manĝis kaj eĉ tranoktis ĉe judaj riĉuloj.

Ekzemple, mia patrino (1922-2004), kiu kreskis en juda riĉa familio en la regiono Transkarpatio (aliaj nomoj: Rutenio, Subkarpatio, Karpato-Rus Ukraina, Podkarpatska Rus, Zakarpattia, Rutenfold ktp), rakontis al mi, ke ili regule havis malriĉajn manĝgastojn je certaj tagoj de la semajno.

Ŝerco:

Amanta edzo

Malriĉulo gastis dum kelkaj tagoj ĉe riĉa malproksima parenco. Tiam tro tedis la afero al la riĉula edzino kaj ŝi diris al la gasto:

"Mi ege miras pro tio, ke vi ne sopiras je via edzino, kiu restis sola hejme."

Ekbrilis la okuloj de la malriĉa gasto kaj li respondis:

"Vi bele parolis. Mi tuj sendos al ŝi telegramon kaj invitos ankaŭ ŝin."

Arcadij STRUGACKIJ, Boris STRUGACKIJ

LA BURGIO
KONDAMNITA



"Morto de artisto" estas la nova romano de Anna Löwensstein (Italio) post la fama verko "La ŝtona urbo". La libro estis akurate liverita al la surloka libroservo de FEL.

Pri "Vivo kaj verko de la juda poetino Rose Ausländer" prelegis Christiane Oetter (Germanio)

Pri "Armena literaturo en Esperanto" parolis Karine Arakelyan (Armenio).

"Rakontaro Genĝi kaj verkisto Dazaj-Osam" Rakontaro

Genĝi estis verkita de ĉanbelanino Murasaki-Ŝikibu ĝuste antaŭ 1.000 jaroj; ĝi estas probable la plej malnova romano konata ne nur en Japanio, sed eĉ en la mondo. Okaze de la 1.000-jara jubileo Tacuo Huĝimoto el Japanio komencis ĝin traduki kaj prelegis pri ĝi.

Prelegoj pri vojaĝo estis faritaj de Bernard Vivier pri Japanio en 2007, kiam okazis tie UK en Jokohamo. Liba kaj Floreal Gabalda prezentis fotojn, filmon kaj dancojn pri Venezuelo, kiun ili vizitis en somero 2008. Rémy Bouchet rakontis pri sia stud-vojaĝo tra Norda Vjetnamio. Li montris bildojn pri la lando kaj pri famaj historiaj lokoj pro koloniado kaj milito.



Liba kaj Floreal prezentis Venezuelon, bilde, kostume kaj dance.



La vojaĝo de Rémy Bouchet tra Vjetnamio



Simone Cajelot provas la tipan vjetnaman ĉapon



Ĵak Le Puil
koncertas.
La danĝera ul'



La publiko en la
salono aŭlo

La distraj vesperoj arigis en granda salono "aŭlo" ĉiujn partoprenantojn. Ni povis ĝui la koncertojn de Ĵak Le Puil, fama pro lia kanto "La danĝera ul'" kaj multaj aliaj. Iuj ŝatis la koncerton de

Alejandro Cossavella el Argentino, kiu jam de monatoj turneas tra Eŭropo. Li kantis en Esperanto, kaj en la hispana kaj portugala, ofte simplaj kaj ne profundaj kantoj. La armena vespero estis ankaŭ tre ŝatata. Karine Arakelyan prezentis bildojn kaj filmon pri Armenio. Ŝia nevino Hasmik dancis kaj kantis por la publiko tradiciajn armenajn kantojn. Poste la publiko estis invitata gustumi specialaĵojn el Armenio, manĝaĵetojn kaj alkoholaĵojn.



13 partoprenintoj en la 1a IF kaj partoprenantoj en la 25a IF

Aparte alloga estis la jubilea vespero por tiu 25a IF.

Kiuj el la partoprenantoj de la nuna IF jam partoprenis en tiu unua IF antaŭ 29 jaroj? En speciala magia teatro necesis diveni per palpado, kiu estas kiu. Finfine atingis la scenejon 13 konataj samideanoj. Ĉiu el ili rakontis iun anekdoton aŭ spertaĵon pri iama IF. Plej interese estis vidi la fotojn de Brian Moon, kie aperis tiuj iamaj partoprenantoj, sed ja multe pli junaj. Poste venis la surprizo de la organizantoj. Oni alportis 2 tri-etaĝajn kukojn kaj plurajn botelojn da ŝaŭmvino. Certe necesis viciĝi por ricevi pecon, kiun Harald kaj HDP distranĉis.

Poste la etoso iĝis pli kaj pli gaja inter la diversaj rondoj.

Ŝajne regis plej multe da ridemo inter litovinoj, sed ne nur..



Harald kaj HDP regalias la IF-anojn



Certe la plej grava kaj sopirata vespero de la semajno esti tiu de la 31a de decembro por festi la novjariĝon.

Post la vespermanĝo pluraj paroj enkondukis la balon per prezentado de Polonezo. Ĝi iĝis jam tradicia programero de IF kaj ege ŝatata de la dancantoj kaj de la publiko. Certe ĉi-jare abundis la spaco por ĝin prezenti en la granda manĝo-salono.



Poloneza parada danco
por malfermi la balon



Poste komenciĝis la balo, kiun HDP regule interrompis por bondeziri laŭ la horzonoj. Unue, sed iom malfrue, je la 21a al koreoj, japanoj, kiuj jam de 4 horoj estis en 2009, poste al rusoj je la 22a, al latvoj, litovoj, israelanoj, armenoj je la 23a.

Kompreneble je noktomezo



ekestis la novjaro por ĉiuj. La glasoj estis plenaj por tosti kaj bondeziri al ĉiuj **Feliĉan Novan Jaron** kaj interŝanĝi kisojn. Je la unua matene nova interrompo por britoj, portugaloj, kaj iom escepte aldoniĝis kanadanoj por ne bezoni atendi ĝis la 6a matene.

Bedaŭro
Rob prizorgis la dancmuzikon, sed ŝajne ĉi-jare li ne sukcesis kontentigi la dancemulojn, kiuj ofte plendis pri neoportuna muziko. Tamen kelkaj sukcesis danci? Sed iam eĉ neniu dancis.



Novjara promeno

Por la novjara promeno, kiun multaj partoprenis, ni laŭiris iom la Rejnon tute proksime de la IF-ejo. La vetero estis iom pli griza ol en antaŭaj tagoj.




Kuketoj "Printillo"



La tuttaga ekskurso celis unue la urbon Akeno (Aachen). Famaj estas tie la akenaj spickukoj nomataj "Printillo". Ili ne estas industrie fabrikataj, sed ĉefe en malgrandaj kukejoj. Ni vizitis unu el ili,

ricevis multajn detalajn informojn pri la fabrikado de "Printillo" kaj gustumis diversajn. La katedralo de Akeno estis konstruita en la jaro 800 kaj estis la iama reĝa kapelo de Karolo la granda. La tagmaĝo okazis en la belga urbo Kelmis. Tie, dum paŭzetoj s-ano Mathieu Schrymecker interese informis pri la aparta situacio de tiu landlima anguleto.

Kelmis-Moresnet apartenas al Belgio, sed inter 1815 –1919 ĝi estis "neŭtrala ŝtato Moresnet" (pro malakordo inter Prusio kaj Nederlando, Belgio ekzistis nur ekde 1830). La eta "tortopeco" famiĝis inter esperantistoj, ĉar fondiĝis la Esperanto-stato 'Amikejo', en aŭgusto 1908, do ĝuste antaŭ 100 jaroj...



La nacia vespero estis la lasta de la IF-semajno. Ĝi estis aparte agrabla, ĉar multaj talentuloj proponis siajn hobiajn, siajn artojn. Arlette Plutniak lerte arigis kante-mulojn por krei la IF-koruson, kiu plezurigis la publikon.

IF 2008-2009 tiel finiĝis, iuj sukcesis ankoraŭ ĝui la plilongigan tagon. Multan dankon al HDP, kiu klopodis kontentigi ĉiujn.



fotoj + raporto: Andreo



Renkontiĝo en Esperantio

Vizito al amiko en Togolando

de Roberto Kueny



Esperantisto de dudek kvin jaroj, mi ekkonatiĝis kun afrika grupo kiu ĉeestis la jubilean UK-on en Varsovio en 1987. Inter ili Mensah B. Atiogbe-Agbemadon el Togolando. Ni daŭre korespondas letere de la unua renkontiĝo. Mi jam revidis lin dum la UK-oj de Vieno en 1992 kaj Vilno en 2005 kaj li vizitis mian hejmon post la UK-o de Vilno.

Li invitis min al sia lando, kaj ni interkonsentis renkontiĝi en 2008.

Jen Roberto survoje al Lomé la 1-an de novembro 2008. Mi estis gastigita de Mensah en lia domo kun lia familio. Lia hejmo estas situata en vilaĝo nomita Zowla, apud la urbeto Aneho, proksime de la limo de Benino kaj de la maro, oriente de la lando.

Li ankoraŭ deĵoras kiel direktoro de mez-lernejo kaj samtempe profesoro pri Historio kaj Geografio. Matene, je la sesa, li foriras per motorciklo por atingi la kolezion, post duon-horo da veturado sur kamparaj vojoj. Sed posttagmeze li estas libera por ekskursi kun mi en la ĉirkaŭaĵoj, por viziti la vidindaĵojn, renkonti la eminentulojn de la vilaĝo, kaj eĉ dum tri tagoj por viziti en Lomé, la



La gelernantoj serioze enviĝas en la lernejo-korto



La "jovo" kun la gelernantoj



Memor-panelo

INSTITUTO ZAMENHOF

Simbolo de amikeco inter:
Hans BAKKER (Nederlando)
GBEGLO Koffi (Togolando)
danke al la internacia lingvo
ESPERANTO



Koffi Gbeglo (maldekstre) kaj Mensah

ĉefurbo, la imponan, privatan kolezion nomata "Instituto Zamenhof".

Alvenante mi miregis pro la domo kaj la mult-nombraj gelernantoj kiuj ĝoje akceptis min!

La Instituto estis kreita de eminenta enlanda esperantisto Koffi Gbeglo (ankaŭ akademiano), kaj de Hans Bakker el Nederlando, kiu responsis pri la afrika movado dum multaj jaroj.

En tiu kolegio, la gelernantoj estas vestitaj blank-verde. . . . kompreneble (vidu foton).

La monumento de la Sendependeco




En la tria jaro de studado, ili. . . kompreneble lernas la Internacian Lingvon. Dum tiu semajn-fino okazis ankaŭ kunveno de la loka Eo-grupo. Ok tagoj poste, Mensah kaj mi estis invititaj en la familio de Koku, kie la gefiloj parolas Esperanton. . . denaske. Jes ja! La vizito al la granda merkato de la urbeto Vogan, estis tre impresiga, multkolora, vige viv-plena.

Mi malkovris ankaŭ la fosfat-minoj apud Lome. Ni ĉiam veturis per taksio sur ne tre glataj vojoj.

Aŭ transiro de la granda lago apud Zowla por viziti la onklon kaj familianojn.

Pri kio mi ne tro kutimas, dum unu monato, estas elteni la varmecon, (kiam frostas en Eŭropo!) : ekŝvitado de la matenmanĝo ĝis la vespermanĝo, . . . kiam la kuloj malagrabiligas la amikan etoson. Sed dum la restado, mi, la "jovo" (la blankulo), ekkonis multajn vilaĝanojn babilante antaŭ freŝa kaj bonega enlanda biero. Mi spektis kompreneble la tradiciajn festojn kun dancoj kaj tam-tam-muziko.



Mensah kaj mi antaŭ "lia kolegio" de Wogba

Do mi spertis dum unu monato la viv-manieron (tio kion mi deziris!) kaj manĝaĵon en afrika vilaĝo. Por mi, ne forgesbla restado en familio de esperantista amiko, kie oni parolas ofte nur la regionan lingvon nomata "Mina", sed la oficiala en la lernejo estas la franca.

Kien estontece?

Kokou, mia afrika persona nomo!

La belega nepineto adiaŭas Roberton



Memorinda evento... Zamenhof-tago en la UNESKO-sidejo

Parizo – 15an de decembro 2008



“... Pli ol 200 personoj plenigis la salonon, kiam mi alvenis kun la grupo de Troyes.

Agrabla etoso de zumanta abelujo! Mi rapide okulumas al konataj ridetantaj vizaĝoj, sukcesas babili kun kelkaj, sed jam venas la momento de la prelegoj .

Du horojn kaj duono da seninterrompaj, tre interesaj paroladoj... Fakte, ĉar ĉio dirita estis de mi plejparte konata, mi ĉefe dediĉas mian atenton al la teknika flanko de la afero...

Duono de la ĉeestantoj disponas pri skribtableto, sed por ĉiu senescepte, orel-kovriloj (aŭskultiloj) por doni samtempan tradukon, laŭ elekto de unu el ĉirkaŭ ok lingvoj. Sed ĉi-vespere, nur du lingvoj estis uzataj, la franca kaj la esperanta. Ĉar la ĉeestantaro konsistas ĉefe el francaj esperantistoj, mi iomete demandas min, ĉu valoras traduki. Tamen, kiam mi

kapablas regi la sistemon, mi tre rapide vidas la avantaĝon. Kelkaj voĉoj de prelegantoj estas ne sufiĉe laŭtaj, aŭ en frekvenco ne sufiĉe bone kapteblaj; en tiu kazo, la aparato redonas la originalon laŭ pli laŭta kaj pli aŭdebla sono. Kelkfoje la voĉo de la interpretisto pli bone agrablas al la orelo ol tiu de la preleganto ĉe la mikrofono. Cetere, kelkaj gastoj deziras kontroli siajn kapablojn en la tradukita lingvo, kelkaj aliaj deziras kontroli la fidelecon al la originalo, kelkaj ankaŭ vere bezonas la tradukon, ĉar ili scipovas nur la francan aŭ nur la esperantan, do tiuj "kaskoj" riveliĝas tre utilaj. Mi ankaŭ konstatas, ke la virinaj voĉoj estas pli facile kapteblaj, kaj inter la viraj, tiu de Cyrille Hurstel ankaŭ tute taŭgis kaj estas tute klara.

El la paroladoj, ne eblas rakonti pri ĉiuj. Henriette Walter atentigos interalie pri strangaĵoj de la franca lingvo, ekzemple la vorto *ineffable*, ne havas la malan vorton *effable*, same la vorto *démolir*, ne posedas korespondan malan vorton...

Aŭskultante S-ron Zaleski-Zamenhof, mi ĉefe ŝatas la fakton, ke li persone parolas al sia avo !... Mapo sur ekrano ebligas kompreni la diversajn sinsekvajn politikajn statutojn de Bialistoko, neeblo por iu lando postuli la honoron esti la ekskluziva naskiĝ-lando de L. Zamenhof, do prefere oni konservu la ideon, ke li apartenas al ĉiuj landoj en la mondo, kaj ke la aparta trajto de la lingvo estas amikeco.

Interesa DVD-filmo montras lecionojn, liveras argumentojn por esperanto kaj intervjuojn de gejunuloj. Kun entuziasmo de junulino prelegos Estelle Loiseau.

Ĉar ĉiuj prelegoj laŭdis la meritojn de la lingvo (eĉ Unesko-gravulo agnoskis, ke la esperantistoj estas tre utilaj kaj efikaj, kiam Unesko bezonas tradukojn de mesaĝo en tre diversajn lingvojn), ĉu la sekva diskuto kun la publiko restus en simila optimismo ?... Plejparte ne, ĉar kiam multaj ĉeestantoj starigas la demandon, ĉu la eniro de esperanto en la francan nacian edukadon progresas, iĝas la respondo negativa, eĉ la franca lingvo estas minacata...

Tamen, iu intervenanto konkludios, ke la metra sistemo bezonis du jarcentojn por esti agnoskita kaj uzata, kaj ke ni devos pacienci por ĝui sukceson de nia ankoraŭ tre juna lingvo.

Alvenas la momento de la tradicia bufedo, dum kiu la kunpremitaj homoj ne sukcesas facile atingi la manĝeblajn frandaĵojn kaj trinkaĵojn -kelkaj gastoj eĉ devos rezigni pri tio...- kaj baraktos por retrovi siajn amikojn en la moviĝanta homamaso !

Bonŝancon mi havas, mi ja sukcesas kapti S-ron Zaleski-Zamenhof, por ke li subskribu la ĵus eldonatajn librojn de "*La rue Zamenhof*", t.e. kelkaj ekzempleroj, kiujn mi ricevis pro grava rolo en la traduko-tasko... Amikoj el Troyes profitas la renkontiĝon por foti nin kune. Sro Zaleski-Zamenhof aldonas : "*Fotu min kun mia nepo*". Pluraj tiam malkovros, ke li estas akompanata de sia nepo Pierre, bela ridetanta junulo, kaj memevidente ili plezure plenumos lian deziron.

Ĉiuj esperas, ke la "nepo de la nepo" sekvos la spurojn de la avo, kaj de la "avo de la avo" !...

Sed jen, oni anoncas al mi, ke mi devas rapidi sine de la grupo, cele metro- kaj trajno-revenvojaĝon...

Ĝoja etoso regos en la kupeoj !.. Ĉiuj estas kontentaj pri tiu renkonto en Unesko, kaj ankaŭ pri la antaŭa tre sukcesa Zamenhof-tago en Troyes... Nu, pri tio estus nun tro longa rakonto”.

Ginette Martin

... un site à consulter en permanence !...


aktualigitaj informoj pri estontaj aranĝoj, fotoj pri okazintaj eventoj estas daŭre troveblaj ĉe

<http://esperanto.alsacelorraine.neuf.fr>

ĝi estas la retejo de nia asocio, informas pri ĝiaj aktivecoj, pri la lokaj grupoj kaj pri Esperanto

multaj ligoj ebligas rapide trovi aliajn interesajn tetejojn en Francio kaj en la mondo

Mulhouse-Esperanto kaj ties aktivecoj



En oktobro 2008, komence de la lerno-jaro ekfunkciis la Esperanto-kursoj en La Kulturdomo Espace 110 en Illzach apud Mulhouse. Ĝia ampleksa broŝuro anoncis la Esperanto-kursojn por komencantoj kaj progresantoj, merkrede kaj ĵaŭde vespere de la 18a30 ĝis la 20a. Frédéric Porretti pretis gvidi la kurson por komencantoj. Malgraŭ kelkaj komunikoj en la lokaj gazetoj, ni sukcesis havi nur unu lernanton en la kurso por komencantoj. La kurso por progresantoj tuj povis komenciĝi kun 4 gelernantoj. Ni uzas tekstojn de la libro "La Miks-ĉifona knabino.", kiu taŭgas por la diversaj niveloj de niaj gelernantoj. Ĝin gvidas André Grossmann.

La kultur-domo Espace 110 estas la sidejo de nia asocio, kie ni povas organizi niajn kunvenojn, festetojn, ktp.



La kultur-domo en Illzach okazigas ĉiu-jare en novembro gravan manifestacion pri bildrakontoj, nomata Bédéciné.

Laŭ iniciato de Simone Kiry, nia loka asocio povis havi tie senpage tablon por prezenti Esperanton al la publiko kun la ebleco montri kaj eĉ vendi bildrakontojn en Esperanto.

Ni efektive sukcesis vendi iom da bild-rakontoj en Esperanto. "Gastono", "Eta Spiru", kaj "Tinĉjo".

La kalendaroj 2009 estis aparte oportunaj por disdoni al la publiko kaj al pli interesataj homoj ni donis la prospekton "Langue Equitable".

Zamenhof-festo:

Niaj Zamenhof-festoj estas organizitaj laŭ-vice en Svislando, Germanio kaj Francio. En 2008 estis la vico de la Bazela grupo ĝin organizi.

Ĝi okazis la 13an de decembro ekde la 15a horo. La partoprenantoj estis akceptita per kafo kaj diversaj memfaritaj kukoj kaj tortoj.

Aparte interesa estis la prelego de Andy Künzli, pri Ferdinand Hodler kaj ties filo Hector Hodler. La patro estis komence de lasta jarcento fama svisa pentristo. Li ofte uzis sian filon kiel modelon por siaj pentraĵoj. Künzli montris al ni plurajn pentraĵojn, kiujn li interese komentis kaj komprenigis al ni la evoluon de lia arto. Certe la patro deziris, ke la filo ankaŭ iĝu pentristo. Sed tiel ne okazis. Sed li tamen subtenis sian filon en liaj Esperanto-aktivecoj.

Poste Ursula Niesert klarigis pri EDE, Esperanto Demokratio Eŭropo kaj la bezonataj subskriboj por ke EDE povu kandiditiĝi por la venontaj Eŭropaj balotoj en Germanio.

André Grossmann informis kaj invitis al la venonta regiona staĝo en Landersen, kaj ankaŭ montris la lastan eldonaĵon de TAKE, nome la Jarkolekton de TAKE 2008.



La vespero finiĝis per svisa rakledo akompanata de francaj vinoj en internacia amika etoso.

Mulhouse-Esperanto regule eldonas sian tri-monatan bultenon **Sud-Rejna Kuriero**, komuna al la grupoj de Bazelo kaj de Mulhouse. Aperas ĉefe tekstoj en Esperanto sed ankaŭ en la germana kaj en la franca.

La 8an de januaro 2009 anstataŭ nia kurso por progresantoj, okazis nia unua kunveno de la jaro por kune festi la tri reĝojn. Ni havis ĉi-foje la plezuron akcepti Henriette kaj Edmond Ludwig el Stosswihr.

Ni surtabligis 4 grandajn migdalo-tortojn, bongustan alzacan vinon kaj teon. Pro la hazardo de la 3 unuaj kukoj elektiĝis 2 reĝoj kaj 1 reĝino. Ni kune tostis je la nova jaro kaj je la sukceso de Esperanto en agrabla kaj amika etoso.

André Grossmann

Une parlementaire européenne propose des amendements en faveur de l'espéranto

(traduction d'un article de *Libera Folio*, média espérantiste gratuit en ligne)



Une parlementaire de l'Union Européenne place ses espoirs dans l'espéranto.

Ljudmila Novak, membre slovène du Parlement Européen, a présenté à la Commission parlementaire de la culture et de l'éducation une proposition pour l'introduction de l'espéranto comme langue commune de l'UE.

En répondant aux questions de *Libera Folio*, Ljudmila Novak explique que la proposition sera certainement refusée au vote, mais qu'elle peut cependant être utile pour lancer un débat sur les problèmes linguistiques et le rôle éventuel de l'espéranto.

Ljudmila Novak est membre du groupe chrétien-démocrate du Parlement Européen, et dans son jeune âge, elle a même étudié l'espéranto, que cependant elle ne pratique plus activement. En 2007, elle a participé au 7ème congrès de l'*Union Européenne d'Espéranto* en Slovénie.

Sa proposition sur l'espéranto a été présentée le 21 janvier, quand la *Commission parlementaire de la culture et de l'éducation* traita du rapport sur le multilinguisme. Selon sa proposition d'amendement, au rapport devraient être ajoutés trois points, que voici :

- ...constate que le **principe du respect de l'égalité des droits** ne peut être garanti par l'utilisation d'une langue nationale (l'anglais) comme « lingua franca ».
- ...propose que, tout en conservant et utilisant les langues vivantes, en respectant la diversité linguistique et en favorisant l'étude de plusieurs langues, on réfléchisse à la possibilité et à l'utilité de **l'introduction dans l'UE d'une langue construite commune, par exemple l'espéranto**. Lui seul pourrait faciliter l'intercompréhension entre Européens et avec les habitants des autres continents, parce qu'il est simple d'apprentissage et d'utilisation.
- ...constate que l'introduction de l'euro comme monnaie commune européenne a grandement facilité le commerce entre les États, a stimulé la croissance économique et contribué à une plus grande stabilité dans l'UE. Des résultats similaires pourraient également être obtenus par l'introduction d'une langue de communication commune, qui en aucune manière **ne chasserait ni ne limiterait l'utilisation des langues nationales** et des autres langues utilisées dans l'UE.

"Libera folio" s'est adressé directement à Ljudmila Novak pour plus d'informations.

Libera folio : Pourquoi avez-vous décidé de faire votre proposition au sujet de l'espéranto ?

Ljudmila Novak : *Parce que l'intercompréhension est difficile dans l'UE, bien qu'on étudie les langues étrangères. Il n'est pas juste qu'une langue nationale (l'anglais) soit utilisée comme langue commune.*

L. F. : Que pensez-vous de la politique linguistique actuelle des instances officielles de l'UE ?

L.N. : *L'UE s'emploie à prendre en considération toutes les langues officielles de l'UE et agit pour renforcer le principe du multilinguisme. Malgré cela, la majorité des documents sont en anglais ou en français, au moins dans un premier temps, et ainsi les autres langues n'ont pas les mêmes droits.*

L. F. : Quel rôle, selon vous, l'espéranto pourrait-il avoir dans les instances officielles de l'UE, et plus généralement dans l'UE ?

L.N. : *L'espéranto, en gardant simultanément les langues nationales, pourrait être une langue de communication commune entre les citoyens des différentes nations, particulièrement parce qu'il est facile, et que les citoyens moins doués pour les langues pourraient eux aussi l'apprendre rapidement.*

L.F. : Y aura-t-il un débat sur votre proposition ? Si oui, quand ? Et quels arguments présenterez-vous à cette occasion pendant la discussion, et quel résultat en attendez-vous ?

L.N. : *Le débat de ma proposition a déjà eu lieu à la Commission pour la culture, le 19 janvier 2009. Actuellement, je n'ai pas encore de nombreux soutiens. Je souhaitais attirer l'attention des membres de la Commission, et leur suggérer cette possibilité. Mes amendements seront refusés lors du vote, mais ils seront lus et discutés dans tous les groupes politiques.*

Ces propositions de Ljudmila Novak, membre du Parlement européen, ont été enregistrées sous la référence PE 416.668v01-00, dans le cadre du rapport sur le multilinguisme, rapporteur Vasco Graca Moura, trois propositions de modifications de l'article 4.

Svislando - pozitiva voĉdono por movo favora al Esperanto



Laŭ komunikado de *radio RTN* en Marin, Neuchâtel (Neŭŝatelo), la Kantona Konsilio (legislativa instanco de "provinco" Neuchâtel en Svislando) ĵus akceptis la movon "Valorigi Esperanton" per 60 poraj voĉoj kaj 41 kontraŭaj voĉoj.

Sinjoro Alain Bringolf kiel deputito lanĉis tiun movon, kiu ricevis apogon per subskribo de 27 deputitoj, kiam ĝi estis oficiale transdonita al la registaro de la kantono Neuchâtel.

Sinjoro *Alain Bringolf* kaj Sinjoro *Claude Gacond* estis kolegoj en la kantona parlamento dum pluraj jaroj kaj konas unu la alian ekde jardekoj. Same ili estis kolegoj en la lernejoj de la urbo La Chaux-de-Fonds, kie ili dediĉis sian tutan vivon al instruado al infanoj. Tiel sinjoro Bringolf povis konsciĝi pri la valoro de la aktivecoj de sia kolego Gacond.

Sinjoro Claude Gacond estas arkivisto de la *Centro pri Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI)*, kiu situas en la urba biblioteko de *La Chaux-de-Fonds*. Li dediĉis sian tutan vivon al Esperanto. Emerito, li laboradas en tiu centro, instruas kaj prelegas sub la aŭspicioj de *Svisa Esperanto Societo* kaj *Svisa ILEI Sekcio*. Tiuj du instancoj estas sekcioj de la tutmondaj organizaĵoj UEA kaj ILEI. UEA dufoje ricevis agnoskon kaj apogon fare de UNESCO. En CDELI kunvenadas svisaj esperantistoj por renkontiĝi, studi, uzi la lingvon. Al CDELI venas eksterlandanoj por viziti la lokon kaj esplori en la riĉeco de la dokumentaro tiea. Rimarkindas, ke Esperanto kaj UNESCO havas la samajn celojn : subteni liberan kaj demokratian informfluan en la kampoj de edukado, sciencoj kaj kulturo.

Pormemore : en la jaro 2008, du deputitoj el la kantono Neuchâtel sinjorino *Francine John* kaj *Gisèle Ory* proponis UEA-n por la Nobel-premio por Paco. Malgraŭ la fakto, ke UEA ne ricevis tiun premion, la kandidatiĝo jam havis fortan eĥon en la tuta mondo. En 2009, deputito el Pollando en la Parlamento de Eŭropa Unio sinjorino *Margareta Handzlik* denove proponis UEA-n kiel kandidaton al la Nobel-premio pri Paco.


Aomori, Japanio, 2009-02-19

Mireille Grosjean

Kun-prezidanto de Svisa Esperanto Societo

Prezidanto de Svisa ILEI sekcio Reprezentanto de Svislando en la Komitato de UEA

Prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono de UEA.



D'après un communiqué de radio *RTN* à *Marin, Neuchâtel*, le Conseil cantonal (instance législative de la "province" Neuchâtel, en Suisse) vient donc d'accepter la motion "Valoriser l'espéranto" par 60 voix pour et 41 contre.

Alain Bringolf, en tant que député, a lancé cette motion qui a reçu un appui par la signature de 27 députés, lorsqu'elle a été officiellement transmise au gouvernement du canton de Neuchâtel.

MM. Alain Bringolf et *Claude Gacond* étaient collègues au parlement cantonal durant plusieurs années et se connaissaient depuis des décennies. De même, ils étaient collègues dans des écoles de La Chaux-de-Fonds où ils ont consacré toute leur vie à l'enseignement aux enfants. Ainsi, M. Bringolf put prendre conscience de la valeur des activités de son collègue. Claude Gacond est archiviste au *Centre de Documentation et d'Études sur la Langue Internationale (CDELI)*, qui se trouve dans la *Bibliothèque municipale* de La Chaux-de-Fonds. Il a consacré toute sa vie à l'espéranto. Retraité, il travaille dans ce centre, enseigne et fait des conférences sous les auspices de *Svisa Esperanto Societo* et de la section suisse de *ILEI (Ligue Internationale des Enseignants Espérantistes)*. Ces deux instances sont des sections de l'Association Universelle d'Espéranto (UEA) et de ILEI. L'UEA a reçu à deux reprises une reconnaissance et un appui de l'UNESCO.

Au CDELI se réunissent des espérantistes suisses pour se rencontrer étudier, utiliser la langue. Au CDELI viennent des étrangers pour visiter les lieux et explorer la richesse de la documentation qui s'y trouve. Il est à remarquer que l'espéranto et l'Unesco ont les mêmes buts : soutenir le flux d'information libre et démocratique dans les domaines de l'éducation, des sciences et de la culture.

Pour mémoire : en 2008 deux députées du canton de Neuchâtel, *Mmes Francine John* et *Gisèle Ory*, ont proposé l'UEA pour le prix Nobel de la Paix. Malgré le fait que l'UEA n'ait pas reçu ce prix, la candidature a déjà eu grand écho dans le monde entier. En 2009, une députée de Pologne au Parlement de l'Union européenne, *Mme Malgorzata Handzlik*, a de nouveau présenté l'UEA comme candidat au Prix Nobel de la Paix.

... Ni trafe argumentu ...

Por la *Eŭropa Voĉdonado 2004*, la franca sekcio de la politika movado "Eŭropa Demokratio Esperanto" (EDE) preparis reklamajn filmetojn, kiujn la franca ŝtata televido senkoste sendis.

Menciante tiujn filmetojn, Bert Schumann persone petis opinion de Claude PIRON, opinio kiu poste estis transsendita al la koncernataj EDE-anoj. Eĉ se tiu argumentaro sin direktas al francaj esperantistoj, ni ankaŭ certas, ke alilandanoj, kiuj scipovas la francan lingvon, povos ĉerpi utilajn informojn pri sia propra sinteno dum intervjuoj aŭ okaze de iu ajn elvoko de Eo.



"... De pluraj flankoj oni petas de mi konsilojn por la baldaŭaj televidaj programoj**. Mi provos ĉi-sube resumi iom de mia sperto.

Miaopinie, plej grave estas scii, **kion oni nepre *evitu*diri**. La plej multaj fuŝoj, kiuj malutilas al E-o, radikas en la uzo de formuloj, kies psikologia efiko estas aperigi E-on malsimpatia. E-o sentiĝas malsimpatia, se la persono kredas, ke estas miksaĵo, ke ĝi estis farita rapide de unu homo, ke ĝi ne sukcesis, ke ĝi povas esti nur elementa, primitiva, malriĉa. .

1 - Miksaĵo

Eblas diri: multaj miksaĵoj estas tre harmoniaj, ekzemple "*salade niçoise*", aliflanke, **ĉiuj lingvoj estas miksaĵoj**, fakte unu el la plej heterogenaj lingvoj estas la angla. Miksaĵo estas io negativa nur, se ĝi ne estas harmonia, se mankis asimilan faktoron. En E-o tia asimila principo bonege funkcias, kontraste kun la angla lingvo, kiu ne kapablas asimili (tial la sama sono skribiĝas /k/ en **king** sed /c/ en **courage**).

2 - Farita de nur unu homo, artefarita

Oni komprenigu, ke la nuna E-o estas rezulto de unu jarcento da uzado fare de homoj el plej diversaj kulturoj. Tiurilate estas esprimoj, kiujn oni nepre ne uzu. Oni ne diru "*langue planifiée*", "*langue artificielle*", "*langue construite*", aŭ "*langue inventée*", oni diru "**langue conventionnelle**".

Oni neniam uzu la esprimon "*de toutes pièces*". Oni evitu ankaŭ "*langue créée*", kaj certe neniam diru (kiel multaj vortaroj) "*créée en 1887*", ĉar tio donas la impreson, ke antaŭ 1887 estis nenio, kaj post 1887 ekzistis la tuta E-o. Fakte, la komponado de E-o estis longa procezo, 1887 estas nur la dato de publikigo, kaj krome la nuna E-o multilate diferencas de la lingvo de 1887. Oni diru "*langue qui s'est développée naturellement, par l'usage, sur la base d'un projet exposé dans une petite brochure*". Oni uzu ankaŭ esprimojn kiel "*langue née de la communication internationale -et donc particulièrement bien adaptée aux exigences de la communication internationale-*".

Tio estas vera, ĉar la nuna E-o rezultas el jarcento da internacia uzado. Ĉio, kio komprenigas, ke **Zamenhof estis nur la iniciatinto**, kaj ke la lingvo fariĝis **vivanta lingvo**, ĉar homoj ĝin efektive uzis en la praktiko, agas efike. Uzu vortojn kiel "*nature*", "*spontane*". Diru "*toute langue vivante résulte d'un processus collectif, spontané et anonyme, en grande partie inconscient et l'E-o ne fait pas exception*" estas efike.

Pri "*artefarita*" oni diru ankaŭ, ke pano, hundoj, rozoj ne ekzistus, se homoj ne estus aplikintajn siajn talentojn. al naturo. Same faris Zamenhof kaj post li la e-istoj ("*ĉefe la verkistoj*", vi povas aldoni, kio nerekte komprenigas, ke E-o havas literaturon). Oni ankaŭ povas rimarkigi, ke "*artificiel*" signifas, etimologie, "*farita kun arto*", "*arte farita*".

3 - Malsukceso

Oni emfazu, ke E-o funkcias perfekte inter tiuj, kiuj lernis ĝin, kaj tiuj estas disvastigitaj sur la tuta terglobo. Por tiuj ĝi bonege sukcesis. Ĝi bonege funkcias inter-rete. Homoj, kiu riproĉas, ke ĝi ne sukcesis, ne konsideras la malrapidan ritmon de historio. La metra sistemo estis proponita en 1660. Ĉu vi rajtus diri, cent jarojn poste, ke ĝi fiaskis, ĉar ĝi estis nenie uzata? Ne, ĝi tiam ***ankoraŭ ne*sukcesis**. Sed nun ĝi praktike konkeris la mondon. E-o post unu jarcento montriĝas pli sukcesa ol la metra sistemo post simila tempodaŭro. Laŭ la maniero, laŭ kiu la intervjuo disvolviĝas, oni povas ankaŭ diri jenon: "*Ĉu por vi, sukcesi signifas, ke la tuta mondo devis adopti ĝin? Ĉu vi dirus, ke la 2CV estis fiasko, ĉar multegaj homoj neniam aĉetis 2CV? Laŭ mi, se tiuj, kiuj ĝin deziris, povis aĉeti ĝin, uzi ĝin, kaj estis pri tio kontenta, ĝi sukcesis. "*

4 - Malriĉa.

Oni diru simple: "*Ne, ĝi ne estas malriĉa. Riĉeco dependas, ne de la nombro de elementoj, sed de ilia kombin-povo. Nia alfabeto kun 26 literoj estas same riĉa kiel lingvo kun dekmiloj da ideogramoj. Ĝi kapablas esprimi same profundajn pensojn. Ĉio en la naturo konsistas el nur kelkaj bazaj elementoj; karbono, hidrogeno, nitrogeno (azote), oksigeno kaj kelkaj aliaj. Kaj tamen la estaĵoj kunmetitaj el tiuj malmultaj elementoj estas nekredinde diversaj. Se vi legas E-an poezion, vi rimarkos, ke ĝis estas same riĉa kiel la aliaj literaturaj lingvoj. "*

Plej efike estas nerekte enkonduki la deziratajn ideojn. Se vi, kvazaŭ preterpase, diras "*L'autre jour, je parlais en espéranto avec un Coréen, quand...*" tio estas multe pli efika ol diri "*Estas e-istoj en Koreio*". Efikeco de intervjuo dependas de la ideoj, kiujn vi ***semas***. Ideo pli bone fiksiĝas en cerbo, se ĝi estis nerekte prezentita, ĉar rekta prezento ofte tuj elvokas reziston. Pli gravas prononci kelkajn ĝustajn frazojn pri E-o ol ĝuste respondi al demando.

Provu do enŝovi mallongajn pozitivajn ideojn pri la lingvo, eĉ se ili ne tute precize rilatas al tio, kion oni demandis al vi. Same pli efikas ekzemploj el la vivo ol abstraktaj pruvoj. Se la intervjuanto diras, ke E-o ne povas esti riĉa, diru. ekzemple: "*Ĉu vere? Kiam mi legas romanon en E-o, mi ne trovas la lingvaĵon pli malriĉa ol kiam mi legas romanon en*

la franca. " (tio enŝovas la ideon: "ekzistas romanoj en E-o" kaj krome la ideon: "Mi parolas pri io, kion mi konas pro propra sperto, dum vi nur faras hipotezon pri io, kion vi ne konas").

Oni evitu esti agresemaj rilate la anglan. Eblas pritrakti la temon tute trankvile, rapide prezentante tri ideojn:

- 1 "L'anglais donne un avantage aux anglophones, c'est injuste, en revanche, l'espéranto, lui, met tout le monde sur le même pied".
- 2. "En Europe, 94% de la population sont incapables de comprendre correctement un spécimen d'anglais courant".
- 3 L'anglais est peu adapté à l'usage international, du fait de sa prononciation, de son orthographe, de sa grammaire floue, de son imprécision et du fait que le sens de ses mots s'écarte souvent de l'usage international (p. ex. "eventual" veut dire "final", alors que dans toute l'Europe continentale le mot existe dans le sens d' "éventuel".)

Atentu! Ne enkonduku tiun 3-an punkton, se vi ne havas **pretajn ekzemplojn**. Estas tre embarase ne povi pruvigi aserton, kiun oni ĵus faris, se la intervjuanto ĝin kontestas. Ne forgesu, ke multaj personoj imagas, ke ili perfekte regas la anglan kaj tre fieras pri tio. Oni ne esprimu sin malestime por homoj, kiuj defendas la anglan. Oni nur montru, ke E-o estas supera, ĉar pli facila (vi povas diri: "à âge égal et à nombre égal d'heures hebdomadaires, les élèves atteignent en espéranto en six mois une capacité de communication qu'ils n'ont en anglais qu'au bout de six ans").

Se la intervjuanto demandas vin: "Kiel vi dirus... en E-o?" kaj vi ne tuj trovas la tradukon, diru, ke certe estas eble esprimi tiun ideon, sed ke vi ne tuj trovas ĝin. Vi povas diri, ke profesiaj tradukistoj ofte ne tuj trovas ĝustan tradukon. Se estas tre tipe franca esprimo, vi povas diri: "Kiel vi dirus tion en la angla?". Ĝenerale la persono ne kapablas respondi. Aŭ vi povas diri: "Vous savez l'anglais?" aŭ "Vous avez appris l'anglais?... Combien d'années?" kaj poste demandu: "Comment dites-vous /frileusement/ en anglais?" Praktike neniu kapablas respondi. Vi do povas diri: "kaj tamen la angla estas lingvo, kiu funkcias, ĉu ne?". La ideo estas demonstri, ke estas stulte atendi de iu ajn, kiu scipovas lingvon, ke li aŭ ŝi kapablu tuj ĉion traduki en la koncerne lingvon, kaj dedukti ion pri la lingvo el lia ne tuja kapablo traduki.

Jen kelkaj ideoj. Se mi pensas pri io alia, mi volonte remesaĝos al vi.

Amike,

Claude PIRON

** el la redakto de "La Informilo" : tiun argumentadon liveris siatempe nia amiko Claude Piron, kiu aludis "televid-programojn", cele balotadon por "Eŭropa Asembleo"



communiqué



Eŭropa Demokratio Esperanto



1 - Pour lire le dernier numéro de eŭropa voĉo, édité par "Eŭropa Demokratio Esperanto" (1,6 Mo) cliquer:

http://www.e-d-e.org/IMG/pdf/EDE_vocxo-fr_juil-janv_2009-11.pdf

- Pour lire tous les numéros:

<http://www.e-d-e.org/spip.php?article205&lang=fr>

Le mouvement politique "**Europe Démocratie Esperanto**" ou "**EDE**", participera aux élections européennes en France et en Allemagne,
Son but est d'informer du problème linguistique en général et de l'espéranto en particulier.

2 - Vous pouvez nous aider.

Nous cherchons des candidats-hommes et surtout des candidates-femmes. Leur seule tâche est de mettre leur nom sur la liste électorale.

Nous cherchons aussi des correspondants locaux/départementaux. Leur tâche est de contacter la préfecture pour la bonne distribution des bulletins de vote.

<http://groups.google.fr/group/edefrance/web/correspondants-locaux>

Salutas Bert SCHUMANN

Cetere, ĉu vi konas la

- politikan E-movadon: <http://e-d-e.org>
- francan E-kastelon: <http://gresillon.org>
- infankongreseton: <http://bertosch.free.fr/iik2009>
- mian familion: <http://bertosch.free.fr/familifotoj>




legitaĵoj !

La roterdama UK estis okazo viziti la plej grandan libroservon de la movado, tiun de UEA ! Malfacilas rezisti je la tento kaj mi do aĉetis ! La plej multajn mi jam legis dum la ferioj kaj mi ŝatus instigi vin malkovri la librojn, kiuj plej plaĉis al mi. La sekvaj tekstetoj ne estas literaturaj kritikoj, ili tutsimple estas prezentoj certe iom supraĵaj de kelkaj legaĵoj dumferiaj.

Edmond LUDWIG

Ni komencu per iom da Historio de la Movado : *Esperanto kaj Socialismo ? Pri la movado sur la " alia flanko "*
Detlev BLANKE (dua reviziita eldono).



Nu, broŝuro verkita de Detlev BLANKE ne povas esti supraĵa kaj malrigora ! Kiu jam ĉeestis prelegojn de tiu fama interlingvisto kutimas je preciza, rigora prelegado ! Tutsame vi ekscios en tiu prezento pri Esperanto en eksa GDR (Germana Demokratia Respubliko), ekde la post-stalina periodo ĝis 1989.

Certe ne ĉiam facilis okupiĝi pri Esperanto, ĉefe post la Dua Mondmilito, sed iom post iom la Esperanto-movado profitis egan oficialan monan subtenon, ekzemple sur la universitata nivelo, kio ebligis altkvalitan pritraktadon en la lando mem kaj kunlaboron kun aliaj frataj respublikoj. Kaj iuj inter vi certe ne forgesis la altan kvaliton de la artaj vesperoj dum UK-oj en la eks-socialistaj respublikoj.

De **Spomenka ŜTIMEC** vi certe rememoras la unuan romanon *Ombro sur interna pejzaĝo*, iu majstroverko de la esperanto-kulturo ! Vi ankaŭ memoras pri la kor-skuaj rakontoj de **Kroata milita noktolibro** cetere tradukita al la franca de nia kun-asocianino Ginette MARTIN (*Journal de Nuit – Témoignage de femme dans la Croatie en guerre*). Jen traduko, kiun vi povas donaci al gekonatoj por ke ili malkovru nian literaturon. Spomenka ŜTIMEC ligas ĉiujn siajn verkojn al Esperanto.

Tiel, ankaŭ ŝia lasta verko, *Hodler en Mostar* (Edistudio), parte rilatas al la movado. Certe vi scias, ke kreis UEA la juna Hektor HODLER. Do ankaŭ pri li la libro iom parolas, sed en la libro ni ĉefe malkovras lian patron, la faman svisan pentriston Ferdinand HODLER kaj ties muzon, Jeanne, kiu iĝis edzino de fama kantisto, kaj post ties morto, de serba soldato, estonta diplomato en la intermilita jugoslavia reĝlando. Jeanne akompanis lin al Mostar, kio estos por Spomenka la okazo priskribi al ni la morojn de la islamaj tieaj loĝantoj antaŭ kaj post la Dua Mondmilito dum la Socialista Federacia Respubliko de Jugoslavio. Vi malkovros ŝian vivon kvazaŭ vi legus romanon !



Kaj nun, ek al alia interesokapta verko : *Krias la silento* (Istvan NEMERE). Ĉu vi scias, ke Istvan NEMERE verkas en 3 lingvoj : Esperanto, la pola kaj la hungara ? En la hungara lingvo oni jam eldonis preskaŭ 300 librojn liajn, kelkajn tradukitajn en aliajn 15 lingvojn, entute temas pri ĉirkaŭ 12 milionoj da ekzempleroj. Dudeko da ili aperis en Esperanto. Vi do ne plu dubas pri la sukceso de liaj verkoj. Kaptos vian atenton *Krias la silento* : verkisto sur la vojo al sukceso estas vokata al naskiĝo de (sia?) filo. La patrino mortis dum la akuŝo kaj la akuŝisto, kuracisto-esploristo, deziras scii, ĉu la bebo pluvivu, ĉar ĝi estas misformita kaj tre certe restos neparolkapabla estaĵo. La verkisto decidas lasi la bebon vivi. Kaj li zorgos pri ĝi ...

Post tiu libro vi bezonos pli leĝeran legaĵon ! Kial ne erotikaĵo ! Jes, jes, ankaŭ en Esperanto, tradukita el la flandra. La titolo: *La bela petveturantino* de Leopold Vermeiren (Flandra Esperanto-Ligo). Temas pri eĉ ses rakontoj ! Ne, mi ne rakontos ! Vi legu mem !!! Temas fakte pri la daŭrigo de *La nuda feino* de la sama aŭtoro.

Al komencantoj kaj certe ankaŭ al plilertuloj sendube plaĉos la rakontoj de **Sandor J. Bako kaj Claude PIRON** : *La dorsosako de Panjo Rut'* (Pro Esperanto) en sufiĉe facila Esperanto, sed samtempe en bela Esperanto. En la rakontoj de Bako respeguliĝas la vivo en orienteŭropa lando, Hungario, ĉe Piron vi ne miros trovi psikodemonstrajn rakontojn, sed vi ankau kunsentos ege kun la suferoj de la diversaj personoj. Kaj tiu japana militkaptito kiu scipovis Esperanton ... Sed, legu mem !



Fine mi rekomendas al vi iom pli pensigan verkon tradukitan el la franca de **Jacqueline LEPEIX**, kiun multaj inter ni konas; ŝi ja dum jaroj laboris en Strasburgo antaŭ ol translokiĝi al Clermont-Ferrand. La temo certe jam cerbumigis vin pro tio, ke vi lernis Esperanton : *La UNIVERSALISMO – Historio, ekonomio kaj filozofio* (Djémil KESSOUS) **Sennacieca Asocio Tutmonda**. La ideo tute ne novas, sed ja pli kaj pli aktualas pro la rapidiĝanta ĥaosa tutmondiĝo, kiun sukcesos reguligi nur iu supernacia instanco demokrate elektita ! Vi legos pri jamaj fiaskintaj provoj, pri projektoj ĝis nun utopiaj. Sed ankaŭ utopioj iam iĝos realaĵoj. Ĉu ne, karaj geesperantistoj ? Cetere: intertempe ankaŭ la aŭtoro mem. funkciisto en la franca konsilio de la ŝtato. lernis Esperanton.

Fonografa parolado de D-ro Zamenhof

okaze de la unua datreveno de la Londona Esperanto-Klubo,
en la 12-a de Januaro 1904.

“... *Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj !*



Ne havante la eblon partopreni persone en la unua jarkonveno de la Londona Klubo Esperanta, mi sendas per fonografo mian koran saluton al ĉiuj partoprenantoj en la kunveno.

En mia imago, mi prezentas al mi, ke mi sidas nun inter vi, estimataj anglaj amikoj de la ideo de lingvo internacia, kaj mi ĝojas kun vi pro la belaj fruktoj, kiujn via energia laborado donis en la daŭro de forinta jaro.

Antaŭ unu jaro nia afero estis ankoraŭ tre malmulte konata en via lando, kaj nun ni havas en via lando jam tre multe da varmegaj kaj sinceraj amikoj, ni havas diversajn klubojn de esperantistoj, ni havas konstantajn kursojn de Esperanto, ni havas belan gazeton esperantan.

Preskaŭ ĉio estas frukto de laborado de la klubo Londona, kiu povas esti fiera je la rezultatoj de-sia unujara penado. Al la noblaj kaj energiaj konduktantoj kaj laborantoj de la Londona Klubo Esperanta nia afero ŝuldas koran dankon

Parolante pri la sukcesoj de la klubo Londona, mi ne devas forgesi pri tiu malgranda rondeto esperantista en Keighley, kiu metis la komencon por nia afero en Anglujo. Nian koran saluton al la esperantistaj Kihlianoj! La laboradon de la Londona Klubo Esperanta la tuta mondo esperantista observas kun granda intereso. Ni ĉiuj esperas kaj antaŭsentas, ke pli aŭ malpli frue, Londono fariĝos unu el la plej gravaj centroj de nia afero por la tuta mondo.

Londono longe dormis, sed kiam ĝi vekigis, tio estos de leono. Potenca voko iros el Londono kaj ĉiam pli kaj pli sonados kaj resonados en ĉiuj partoj de la mondo. Kun atento la popoloj aŭskultados la voĉon venantan el la potenca centro de la angle-parolantaj regionoj. Kiam pri frateco de popoloj kaj pri neŭtraleco de internaciaj rilatoj ekparolos tre potenca popolo kiel la angla, la mondo aplaudos kun entuziasmo, kaj tiu sankta afero, por kiu ni batalas, ekmarŝos rapidege.

Esperantistoj en Londono, esperantistoj en Anglujo, laboru kuraĝe kaj energie. Malfacila, tre malfacila estas la semado, sed dolĉaj kaj benitaj estos la fruktoj. Granda kaj grava estas via rolo. La tuta mondo esperantista rigardas vin kaj multe de vi esperas ...”.

Plej gravas Esperanto en radio ! ...



En ricevitaĵ retmesaĝoj frapis min la mesaĝo de Prof. *J.W.Haazen*, Ŝtata Universitato Sankt-Peterburga, Rusio, kiu bedaŭris, ke ne pli insiste aperas en Esperanto-gazetoj plej diversaj retadresoj de la esperantlingvaj radioj.

Plenplene mi subtenas tiun alvokon. Mi eĉ dirus, ke la gazetoj devus kiom eble plej emfaze informi pri radioj simple pro la fakto, ke dank'al tiuj elsendoj ni posedas por la lernantoj senkoston pedagogian rimedon por atingi kiel eble plej rapide komprenkapablon de flua modela Esperanto. Esperanto ja povas esti lernata nur per skriba materialo, sed bona elparolado kaj flua, nuancoriĉa parola lingvo lerneblas

nurnure per regula aŭskultado de diverstemaj elsenderoj.

Kiel gimnazia instruisto pri la germana mi senĉese insistas ĉe miaj gelernantoj, ke nur plusa aŭskultado de radio ebligas al ili iom post iom kompreni la parolatan lingvon. Konsentite: komence ne facilas kompreni multon, sed jam la muziko de la lingvo gravas, kaj iom post iom la kompreneblo iĝas pli preciza. Cetere: ĝuste ĉe *Pola Radio* mi aŭdis, ke per nova komputila programo, eblas malrapidigi la paroladon en la aŭskultataj elsendoj.

Kvazaŭ perfekta estos la posedo de la lingvo, kiam oni aŭdas kaj komprenas iun, kiu parolas lingvon, eĉ kiam oni ne volas aŭskulti.

Cetere: en ĉiuj retmesaĝoj miaj aperas la ret-adreso de mia plej ŝatata radiostacio. Sufiĉas klaki suren kaj aŭskulti. Faru do same ! Informiĝu ĉe : www.tejo.org/uea/Radioj .

Mi ĉiutage kun plezuro aŭskultas <http://www.polskieradio.pl/eo/> !

Edmond LUDWIG

LIDIA La vivo de Lidia Zamenhof Filino de Esperanto (*Wendy HELLER*) - FEL 2007

Kvankam mi esperantumas de pli ol 30 jaroj, mi neniam havis la okazon legi ion ampleksan pri Lidia ZAMENFOF, unu el la filinoj de Doktoro Zamenhof. En 2007, *Flandra Esperanto-Ligo* eldonis tradukon el angla eldono de la jaro 1985. Tiun tradukon mi deziras konsili al vi.

Kun ega intereso mi sekvis la bedaŭrinde mallongan vivovojojn de tiu ambasadorino de du movadoj ofte kunlaborantaj: *la esperantan kaj la bahaan*. Same kiel ŝia patro ŝi estis idealistino, kiu dediĉis sian vivon al klopodado cele al paca kunvivado de la teranoj. Por Esperanto kaj la bahaa religio ŝi vojaĝis tra Eŭropo kaj eĉ tra Usono. Kial ŝi, antaŭ la dua mondmilito, ne restis en Ameriko? Tiel, ŝi povintus eviti tragikan finon: pereon en la naziaj eksterminejoj.

La francaj legantoj miros pri la preskaŭ nekredablaj nombroj da lernantoj dum ŝiaj *Cseh-lectionoj*! Ili ankaŭ retrovos la nomojn de konataj francaj esperantistoj, kiuj renkontis ŝin. Bedaŭrinde, kvazaŭ nenio estas rakontata pri ŝiaj kursoj en *Elzaso*, en *Haguenau*. Ĉu iu havas informojn priajn?

Edmond LUDWIG

Ilona Koutny: *La Esperantisto de la Jaro 2008*



La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007).

La rezulto de la voĉdonado

Ilona Koutny 12 voĉoj

Peter Baláž 4 voĉoj

Katalin Kováts, Geoffrey Sutton po 3 voĉoj

Normand Fleury, Yves Nevelsteen po 2 voĉoj

Tri kandidatoj ricevis po unu voĉon. Dek unu kandidatoj ne ricevis voĉojn.

D-rino Ilona Koutny, hungarino loĝanta en Pollando, estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2008 pro la kompetenta kaj sukcesa gvidado de la

Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań. Ĉi-jare ŝi aparte meritis rekonon pro la dekjariĝo de la Studoj, pro la ekzamensesio de la tria grupo, pro la unua instrurajta ekzameno kune kun ILEI, pro la komenco de la kvara grupo, kaj speciale pro la simpozio "*Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko*", kiun ŝi pretigis kaj efektivigis ĉi-septembre ĉe UAM.

Ĉi-jara elekto estas duoble rimarkinda. Unue, Ilona Koutny estas la unua virino, kiu ricevis la titolon "La Esperantisto de la Jaro". Due, ŝi ricevis rekorde multajn voĉojn kompare kun la aliaj kandidatoj — trioble pli ol la slovaka aktivulo Peter Baláž, kiu okupis la duan lokon.

Halina Gorecka

sekretario



En 1991, D-rino Ilona Koutny, gastigita de gesinjoroj Gilbert, vizitis la klubon de BAR-le-DUC (FR), kie ŝi interalie prezentis tutmodernan aparaton, t.e. la parolsintezilo « *Speaktronic* ».



Inédit... Rose et Cyrille s'offrent un tour du monde à vélo

A quoi tient un destin ? L'adage prétend à un fil. Mais il peut aussi basculer pour un sourire ! Rose Sanz et Cyrille Pinardon peuvent en apporter un précieux témoignage.

Amateurs de cyclisme depuis leur tendre enfance, ils rêvaient en secret de faire le tour du monde à vélo : « *Nous ne nous connaissions pas et nous avions le même rêve. Sans le savoir* ». Comme quoi le hasard des rencontres fait parfois bien les choses.

Depuis huit ans, ils ont d'abord uni leurs destinées avant de partir pédaler à travers l'Europe : la Suède, les Pays-Bas, l'Espagne, la Croatie et la Bosnie. . . « *L'une des images fortes de nos voyages reste les traces de la guerre en Bosnie. Surtout celles des arbres qui poussent dans les maisons et qui sortent par les fenêtres des étages* », raconte Rose Sanz, employée de La Poste à Fontenay-sous-Bois mais fière d'être native de Narbonne.

Aujourd'hui, avec Cyrille, policier à Paris, ils ont décidé de passer au braquet supérieur. Ils s'élanceront donc pour un tour du monde à vélo le 16 mars depuis Narbonne. Pour deux ans : « *Nous avions envie de réaliser une coupure dans notre vie. Nous voulions faire cette expérience à la retraite mais, après réflexion, nous nous sommes dit pourquoi attendre. Et puis, où en serons-nous dans une vingtaine d'années ?* » L'itinéraire est d'ores et déjà dessiné sur l'ordinateur de Cyrille, plus spécialement chargé de l'intendance. Il en existe même un de substitution. Au cas où. . . Voilà pourquoi le couple ne sait pas vraiment avec précision combien de kilomètres vont défiler sous leurs roues.

